TEA-BULTENO

20ª JARO - N° 140 **NOVEMBRO-DECEMBRO** **N.11-12/2017**

Feliĉo estas la sola afero, kiun oni povas donaci eĉ se oni ne posedas ĝin.
Elisabeth Leseur (1866-1914)

Lingvoj kaj dialektoj

Strangas la vivo! Kion antaŭ multe kaj multe da jaroj oni konsideris malbona, iele kaj iom poste la samo fariĝas la plej ĝusta kaj justa afero.

Tiu ĉi penso traflugis mian menson, en la momento kiam sur la paĝoj de la triesta ĉiutaga ĵurnalo aperis primedita artikolo, havanta la jenan subtitolon:

En la dialektoj niaj radikoj

Pri ĉio ĉi mi daŭre konsentas, malgraŭ ke ondoritme tra l' jaroj la opinioj pri dialektoj iris de unu ekstremo al alia.

Mi ne scias, ĉu kiel ĵus naskitino mi jam pepis triestadialekte, pri ĉio ĉi tute mi ne havas memoron, sed tutcerte, post pepado kaj balbutado, ekestis mia unua senca vortumado triestadialekte, ĉar en familio, kun parencaro, kun amikaro, en vendejoj, do ĉie ajn, tute normala estis la uzado de la dialekto. Eĉ en la komunumaj aŭ administraj oficejoj, en la kulturaj asocioj laŭte sonis tiu komuna interkomprenilo. Kleruloj, verkistoj, poetoj, oficistoj kaj legomvendistoj, riĉuloj kaj malriĉuloj, trovis sin tute komforte, esprimiĝante per tiu hejmeca idiomo. Ĉi ĉio ne devas tamen aparte mirigi, ĉar temis pri logika konsekvenco el antaŭdujarcenta historia realo. Fakte post la edikto (1719) de Karlo 6ª, Habsburga imperiestro, deklarinta la triestan havenon sendogana zono, alvenadis al la urbo el ĉiuj kvar ĉefpunktoj komercistoj, manlaboristoj, maristoj kaj ankaŭ aventuristoj, el plej diversaj etnoj kaj lingvoj, kaj tio kompreneble estigis problemojn pri interkompreniĝo. La triesta dialekto rapide intervenis kaj solvis la problemon, ludante la rolon de ia ... Esperanto!

Ni tamen revenu al mia tiama infana situacio: la unua renkontiĝo (aŭ, pli bone dirite, kraŝo) kun la itala lingvo estis, kiam mi ekvizitis la elementan lernejon. Tie devigaj estis parolado (kaj skribado) itallingvaj. La ununura loko kie mi devis paroli en tiu kvazaŭ fremda lingvo. Nu, mi ne enuos vin, per rakontoj pri la multaj lingvorilataj problemoj superendaj, de mi rezignacie alfrontitaj. Pli-malpli bone mi sukcesis transsalti la obstaklojn, kvankam ankoraŭ nun (maljunaĝe!) ne tute spontanee mi parolas itale, precipe sub emociaj premoj. Pli simpligas la vivon, en tiaj okazoj, la uzado de dialekto aŭ esperanto. En la 1960-70aj jaroj, se mi ne eraras, vortumado dialekta estis konsiderata signo de senklereco, senscieco, de neinstruiteco, de duarangula stato. Sekve de tio ĝi eksmodiĝis kaj furoris la *Dante*-a idiomo. Ekestis iaspeca modo, pro kiu oni pritaksis malklerulo la dialekte parolantan personon. Samtempe multaj spritaĵoj kaj ŝercaĵoj aperis en tiuj jardekoj: oni mokis, foje eĉ tre akre, tiujn triestanojn, kiuj, por esti bonakceptataj en la "altŝtupaj societoj", strebis paroli la italan lingvon sed - ridinde kaj ridige - stumbladis ĉe preskaŭ ĉiu vorto kaj - pli grave - ĉe ĉiu verba tenso.

Amo al dialekto alternadis kun la honto ne kapabli paroli korekte la italan lingvon. Foje mi eĉ aŭdis, ĉefe el buŝoj de junaj homoj, ke "dialekto estas vulgara, ne taŭga por esprimi ĉiajn sentojn, precipe tiujn apartenantajn al la emocia sfero". Probable tiuj neniam legis triestajn romanojn, poeziaĵojn aŭ kantojn, do tute ne havis la ĝustan objektivecon prijuĝi la triestan dialekton.

Nuntempe la societo tute ŝanĝiĝis: denove Triesto fariĝis kosmopolita urbo, kaldrono en kiu miksiĝas plej diversaj lingvoj kaj dialektoj; do, iu konstanta vario pli kaj pli disvastiĝadas kaj plibuntigas per sia diverseco la triestan vivon.

Sed kio plej strangas - kiel mi diris komence de tiu ĉi elverŝado de pensoj kaj rememoroj - estas ke oni ree valorigis la uzadon de dialektoj kaj eĉ favoras iliajn konservadon kaj protektadon. Tio ĉi estimendas, ĉar malantaŭ la vortoj de iu ajn idiomo estas scioj: dialekto ne estas lingva koruptado, nek ia speco de norma kripligita lingvo.

Nenia diferenco ekzistas inter la du idiomoj: ambaŭ estas interhomaj komunikiloj, ĉar ambaŭ, el la struktura vidpunkto, plene funkcias. La aŭtoro de la artikolo asertas, ke "*la diferenco inter dialekto kaj lingvo ne rilatas al beleco aŭ eleganteco de unu aŭ la alia, ĝi nur dependas de la gramatikaj normoj: lingvo nacia devas respekti regulojn laŭ modelo konsiderata korekta; dialekto rilatas al sia interna organizo, al la socia kaj kultura strukturoj el kiuj ĝi devenas, al la kultura horizonto de niaj praavoj, kies mondo konsistis ne nur el vortoj, sed el scioj, praktikaj scioj, el propra koncepto de mondo kaj vivo, kiuj ne plu ekzistas, sed tamen havas en si mem ankoraŭ multon por instrui al ni.*"

Tiu diraĵo vere min kortuŝis: ŝajnis al mi, kiel publika rehabilitado de iu senkulpa iama akuzito. Kiom da antaŭjuĝoj suferis la dialektoj, kvankam klaras, ke iu ajn nacia lingvo ĉerpis sian forton kaj sian vivecon ĝuste el dialektoj.

Fine de la artikolo, en evidentigita kadro, la aŭtoro publikigis liston de la 4 plej malopportunaj antajuĝoj, "kiujn oni devas pensiigi".

1.Kaj lingvo kaj dialekto posedas siajn regularojn. Tial estas bone scii, ke plenrajta estas uzado de dialekta vorto meze de itallingva parolado, kiel same fariĝis tute normale nuntempe enigi vortojn pruntitajn el aliaj lingvoj.

2. Dialekto ne apartenas al pasinteco! Ne estas afero nur de maljunuloj! Ĝi, nuntempe, kunmetita kun la itala lingvo, estas tre laŭmoda: tial bonvenon al dialektaj esprimoj el diversaj partoj el Italio, por pli "bunte ornami" oniajn eldirojn.

3.Dialekto estas lingvo de mizeruloj, lingvo de riĉuloj. Sed ni memoru, ke la praavo de niaj lingvo kaj dialektoj estis la parolata latino.

4. Ni distanciĝu de la *dialektofoboj*, kiuj hororas aŭdante dialektajn vortojn. La tempoj estas ŝanĝiĝantaj: dialekto naskas koherecon, naskas tiun komunan senton de aparteno al ia komunumo. Ni montru nin akceptemaj, komencante per la lingvo: plej grave, fine, estas kompreni unu la alian. ElDo

... kaj nun pri nia lingvo!

DANĜERA LUDO

Eĉ plej malmulte informita esperantistaro scias, kiel pereis Volapük. Ne la indiferenteco de la mondo ĝin mortigis; kontraŭe – la mondo akceptis ĝin kun entuziasmo pli granda, ol poste Esperanton. Volapük mortis, ĉar ĝi estis tro malfacila, tro malsimpla, nekapabla al vivo, nekapabla al la rolo de lingvo universala.

Ankaŭ ĉiu, eĉ plej malmulte informita esperantisto, scias pri la okazoj de la jaro 1907 kaj konas la historion de tiu iama apostolo, kiu ruze perfidis sian majstron kaj semis en la esperantistajn vicojn konfuzon. Ido malvenkis ne nur tial, ĉar devas malvenki ĉio, konstruita sur la fundamento de perfido, sed ankaŭ tial, ĉar kompare kun Esperanto ĝi estis malpli perfekta, ĉar malpli simpla kaj facila.

Multaj projektoj de lingvo internacia ekĝermis – kaj pereis abortite aŭ mortis en la suĉaĝo. La severan provon de la vivo eltenis nur unu, la "simpla, fleksebla, belsona, vere internacia" Esperanto.

La sukceso, la vivkapablo de Esperanto kuŝas grandparte en ĝia simpleco kaj facileco. Atenci tiujn ĝiajn ecojn signifas atenci la vivopovon mem de Esperanto.

Tiu ĉi aserto tute ne signifas, ke ĝi devas esti eterne limigata al tio, kion alportis la jaro 1887.

Esperanto devas evolui kaj povas evolui. Ĝi estas mirinde simila al viva organismo, kiu nutras sin kaj kreskas. Ĝi ĉerpas el la vivodona grundo de la lingvoj naturaj elementojn, kiujn ĝi transformas laŭ sia bezono kaj asimilas.

Tamen tiu ĉerpado kaj asimilado devas konformi al la veraj bezonoj de la lingvo kaj devas okazi "ne tro rapide, ne tro multe unufoje"...

Se patrino, volante akceli la kreskadon de sia infano, ŝtopadus ĝin de mateno ĝis vespero per nutraĵo, dekoble superanta tion, kion la infana organismo povas akcepti, facile estus antaŭvidi la finon: la bela infaneto perdus la vangrozecon, la sanon, kaj eble baldaŭ mem iĝus nutraĵo por vermoj.

De kelka tempo ni observas en Esperantujo la tendencon pliurĝigi la evoluon de la lingvo. Ni vidas kvazaŭ vetkuradon pro novaj vortoj, kvazaŭ konkurson pri tio, kiu povas glori sin per pleja novkreado, kvazaŭ kuradon blindan kun nukrompa rapideco trans montojn kaj valojn.

Kaj tiun facilaniman sporton oni pravigas, asertante, ke tio, kio sufiĉas por proza rakonto, malsufiĉas por la poezio, ke oni ne povas uzi la saman lingvon, por rakonti historieton el ĉiutaga vivo kaj por traduki ĉefverkon de la poezio.

Tamen la vero estas, ke lingvo internacia devas esti por ĉio, aŭ ĝi estos por nenio. Ĝi ne povas havi kelkajn vizaĝojn. Ĝi devas esti unu, aŭ ĝi ne havas *racion* de ekzisto. Oni ne rajtas krei apud la komuna lingvo ian dialekton, kompreneblan nur por elektita sekto, lingvaĵon, por kies kompreno necesas foliumi specialajn vortarojn.

Kaj tiuj specialaj vortaroj – kiu decidis pri ilia neceso? Ĉu la instancoj, kies tasko estas unuigadi la evoluon de la lingvo? Ĝi estas afero privata, kiun oni defendas, dirante, ke ja ne ĉiujare la aŭtoro aperigos ion similan. Par-

6a-paĝe ➤

Laste trovitaj!

De tempo al tempo (*kiam temp' está!*) plezurigas min atenta, perlupea legado de miaj pri-esperantaj poŝtkartoj (*mllg:* pk), bele ordigitaj laŭ-date en siaj apartaj kolektujoj, ĉiam kun espero trovi ion "sukan", kion - eble! - mi preteratentis. Temas pri malstreĉiga sed samtempe ekscita ludado, kiu fojfoje donas tre fruktajn rezultojn. La plej elstarajn esperantistojn facilas rekoni laŭ la koncernaj subskriboj, kvankam bedaŭrinde okazas, ke iele mi erare legis ĉu nomojn ĉu datojn, kun konsekvencoj misvojigaj. Do, ne ĉiam sufiĉas aglokula kontrolado. Estas tamen interese ankaŭ halti antaŭ nomoj de ne tiom konataj samideanoj, precipe el foraj tempoj, kaj komenci traserĉi ion pri iliaj vivo kaj esperantisteco. Nuntempe, krom konsulti *EdE*-n aŭ *Vikipedio*-n, helpas multon la retejo de *Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo* en Vieno, aŭtentika trezorejo de neimageblaj informoj: Eblas tie konsulti periodaĵojn, librojn, dokumentojn, jarlibrojn, admiri poŝtkartojn, fotografaĵojn, insignojn, glumarkojn kaj ankaŭ E-kuriozaĵojn!



Mia esploro komenciĝis per la bildkarta albumo el la jaroj 1930[aj], kaj jen pk sendita al la franca Familio Buecher de la pola esperantisto Edvardo Wiesenfeld, el Varsovio.

Ĝi estis sendita la 13[an] de januaro 1936. En la malantaŭo, inter alie, li petas de la franco sendon de italaj kongreskarto kaj insigno, plus tiun de prikongresa protokolo: supozeble la adresito ĉeestis la UK-on en Romo, 1935.

Serĉado pri Familio Buecher donis nenian rezulton, sed pri Edvardo Wiesenfeld amaso da informoj aperis. Pri li malmulton mi konis, tiel estis tre interese malkovri, kiom grava, aktiva, intense engaĝita en la poresperanta agado li estis. Vere eminenta pola pioniro!

Naskita en Varsovio, la 27[an] de marto 1892, E. Wiesenfeld (pseŭdonime Lonkopolanski) esperantistiĝis en 1912 kaj en 1915 profesordiplomiĝis ĉe la Internacia Instituto de Esperanto, direktita de Edmond Privat. Dum 5 monatoj li laboris en la centra oficejo de UEA, en Ĝenevo, kiel tradukisto. En la jaroj 1913-14 li troviĝis en Francujo pro universitataj studoj, kaj la militeksplodo (aŭg. 1914) baris al li la reirvojon al patrolando ĝis 1916. Reveninte al Varsovio, li finis siajn studojn kaj iĝis dentokuracisto (1918).

Li estis bona amiko de la Familio Zamenhof, tiom ke, kiam *Heroldo de Esperanto* ekpensis "kolekti la plenan kompleton de tiuj, kiuj formas la nedisigeblan Zamenhofujon", li alprenis la taskon "entrepreni la kolekton de l' materialo" (el la *Antaŭparolo* de la *Galerio de Zamenhofoj*, kompilita de E. W. fine de 1924).

Kiel dirite, lia esperanta agado estis tre ampleksa. Unue li fondis la *Polan Esperanto-Instituton*, por instruado de la lingvo, kiun li gvidis ĝis 1930; li estis funkciulo de multaj Esperanto-Societoj en Pollando kaj krome sekretario de la Loka Monumenta Komitato. De 1922 li aktive partoprenis en ĉiuj aranĝoj de la Esperantistaro en Varsovio, ofte kiel ceremoniestro. En 1923 oni elektis lin kiel Lingvan Komitatanon.

E. Wiesenfeld gvidis multajn kursojn, verkis multe da artikoloj, estris dum kelkaj jaroj la Esperanto-Fakon en la monata revuo *Przeglad Swiatowy*, kaj en sia profesia gazeto li aperigis konstantan Esperanto-rubrikon, (*La Dentista Kroniko*) kun Esperanta resumo de ĉiuj artikoloj.



Liaj artikoloj aperis en pluraj periodaĵoj: *Esperanto*, *Pola Esperantisto*, *Heroldo de Esperanto*, *Literatura Mondo* kaj multaj aliaj gazetoj. Li krome elstaris kiel biografiisto pri ĉiuj eminentaj polaj Esperantistoj kaj estis ĉefkunlaboranto de la *EdE*.

El liaj pluraj originalaj verkoj notindas: *Galerio de Zamenhofoj*, 1925; *Vivo kaj verkoj de Felikso Zamenhof*, 1934; Redakcio de *Verkoj de FeZ'*, 1935; kaj aliaj. Krome li estis plurfoje premiita dum la *Katalunaj Floraj Ludoj*.

La morto-dato de Edvardo Wiesenfeld ne est-

sekvapaĝe ➤

Senfina historio - Denove pri palmoleo

En la TEA-Bultenoj n-roj 133ª kaj 134ª, jaro 2016, aperis du artikoloj pri la eventuala danĝero de la uzado de oleo el palmo por la homa sano; inter-alie estis evidentigite, ke ne nur ĝi povus kaŭzi seriozajn domaĝojn al sangocirkulado pro la alta procentaĵo da kolesterolo, sed katastrofaj problemoj ekestus pro la intensa kultivado de palmaj arboj, kio riskus malaperigi la aŭtoktonajn arbospeciojn, kun sekvaj detruado de la loĝlokoj de la tieaj bestoj kaj elteritoriigo de la indiĝenoj, precipe de tiuj vivantaj en aziaj landoj. Ampleksaj kampanjoj estis faritaj pri tiu temo, tiom ke fine, jam ekde pasintjara septembro, sufiĉe granda nombro da industriaj entreprenoj forigis tiun danĝeran elementon el siaj produktaĵoj.

Senarbarigado

Kaj nun, pli precize antaŭ unu monato, aperis plia novaĵo: ekestis unua kazo de rearbarigado flanke de palmolea produktanto, nome la malajzia kompanio, starigita de la landa registaro, *FGV – Felda Global Ventures* – kiu, sekve de fortaj premoj fare de la merkato kaj civila socio, estis devigita reveni sur siajn paŝojn pro seriozaj financaj riskoj, kaj restarigi ĉion kion oni detruis. Substrekindas, ke ĝi estas unu el la plej grandaj produktantoj de la kruda palmoleo, kvotita ĉe la malajzia borso. *FGV* reforstigos 1.000-hektaran zonon en la okcidenta Kalimantan, indonezia parto en insulo Borneo: ĝi estas, ĉiujare, la plej brultrafita teritorio en la tuta Indonezio. Krome, laŭkomunike de *Greenpeace*, *FGV* strebos elimini la ekspluatadon de laboristaro en siaj palmejoj (tio sekve de denunc-enketo fare de Wall-Street-Ĵurnalo - julie 2015).

Plantado de palmarboj

Fakte oni ne pensu, ke tiu nacia kompanio eksentis konsciencriproĉon pro sia agadkonduto aŭ pro subita amo al indiĝenoj kaj bestoj: ĝia 'resaĝiĝo' konsekvencas raporton prilaboritan – aprile 2016 – de *Chain Reaction Research*, konsorcio priokupiĝanta pri la riskoj ligitaj al subteneblo por investistoj kaj financaj analizistoj. Tiu raporto estis priskribinta la financajn damaĝojn trafuntajn la kompanion pro malobservado de eltenebla politiko, nome krom perdo de kelkaj gravaj klientoj ankaŭ ricevo de konsiderinda monpuno.

Konklude, kiaj ajn estu la kialoj, ĉio ĉi estas plia paŝo antaŭen en la strategio por reakiro de ekologiaj sistemoj, protektantaj la teran naturon.

ElDo

Font: www.ilfattoalimentare.it

il fatto alimentare

---

as konata: "Multaj esperantistoj apartenis al la sennombraj viktimoj de la amasmurdado en Pollando, verŝajne kelkaj el ili pro tio, ke ili aktivadis por Esperanto. La pli konataj estas Leo Belmont, Leopold Dreher, Izrael Lejzerowicz, Wilhelm Róbin, Jakób Szapiro kaj ankaŭ Edward Wiesenfeld (jaroj 1941-42)" (el *La danĝera lingvo* – Ulrich Lins - jaro 1988).

Elstara personeco, dediĉinta sian vivon al granda idealo, idealo de frateco kaj homamo, kiu probable estis la kialo de lia frua vivofino.

Fontoj: (EdE, Vikipedio, Trovanto E-Muzeo en Vieno, Pola Esperantisto – 1934-35)

Grava miso!!!

Atentigis min la estimata franca historiisto Jean Amouroux pri malbagatela, riproĉinda eraro mia en la priskribo de "la karto sendita de Edmond Privat al Bude Borjan" (vd. TB -139; pĝ 2ª). Jen liaj pravaj rimarkoj:

"La koncernan karton Privat skribis ne en 1937, sed en 1957. Kio erarigis vin estis, ke Privat ĝin adresis al S-ro Bude Borjan, mortigita en 1941. Vi tamen rimarku, ke tiun nomon Privat skribis intercitile. Ja estis la nomo de esperantista grupo en Zagrebo. Pro preteratento aŭ nescio Privat konfuzis nomon de adresito kun tiu de la grupo, kiu estis ja la adresito. Eraro estas homa, ĉu ne?"

Nenion mi aldonas, nur ke mi pardonpetas al la legantaro kaj dankas la eminentan korektanton.

La redaktanto

Kvizo pri Esperanto-Poeto

La aŭtoro de la poeziaĵo, aperinta en la julia-aŭgusta TEA-Bulteno, estas **Raymond Schwartz**. Gajnis la premion denove nia Egle Mongiello! Gratulegojn al ŝi!

47a Malferma Tago la 25a de novembro 2017

Ĝi okazos en la Centra Oficejo de UEA sabaton la 25an kaj tuj poste, dimanĉe, estos seminario pri informado.

La 47a Malferma Tago estos pontoligo inter la finiĝanta Zamenhof-Jaro kaj la komenciĝanta Jaro de la Esperanta Kulturo. La ĉefprelegantoj ĉi-foje estos Roman Dobrzyński: *Zamenhof en Varsovio*; Spomenka Štimec: *Renkonte al la Jaro de la Esperanta Kulturo - En slava fokuso: Vasilij Eroŝenko*; Amri Wandel: *Kosmo kaj ni: novaj prospektivoj de vivo ekstertera*.

Kiel kutime, en la programo estos ankaŭ prezentado de libroservaj novaĵoj; krome, kafo kaj teo estos senpagaj kaj varmaj la tutan tagon. Aldone al specialaj ofertoj, la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la Libroservo.

La programo daŭros de la 10a ĝis la 17a horo ambaŭtage ĉe Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Roterdamo, Nederlando.

Por pliaj detaloj bonvolu sekvi la Facebook-okazaĵon.

Biblioteka Apogo Bachrich subvencias 8 bibliotekojn

La Fondaĵo "Biblioteka Apogo Honore al la Geedzoj Maria kaj Johano Bachrich", kies celo estas subteni kaj pliriĉigi la kolektojn de E-bibliotekoj, asignis subvenciojn - uzeblajn por akiri librojn aŭ aliajn varojn aĉeteblajn ĉe la Libroservo de UEA - al 8 el la 12, kies petoj estis ricevitaj okaze de la ĉi-jara alvoko.

La subvenciitoj ĉi-jare estis: Kolombia E-Ligo (231,05 €), Berlina E-Ligo (123,92 €), Slovakia E-Federacio (164,93 €), Brazila E-Ligo (224 €), Kuba E-Asocio (327,05 €), Asocio Solidareca Bonvolo (Kongo, DR, 61,00 €), Demokrata Kongolanda E-Asocio (235,95 €), **Triesta Esperanto-Asocio (Italio, 133,78 €)**.

Ankaŭ ĉi-jare ni ricevis konsiderindan kvanton da tre kvalitaj subvencipetoj el diversaj mondopartoj, kun signifa kresko de la nombro da petoj el Afriko - komentas Sara Spanò, Estrarano de UEA pri Kulturo - *elekti la subvenciitojn estis tre malfacila tasko. Ni kuraĝigas ĉiujn koncernatojn respondi al la venontjara alvoko, aperonta kaj en la revuo Esperanto kaj kiel Gazetara Komuniko de UEA. Grava rekomendo: bv. legi tre atente la Regularon por Biblioteka Apogo Bachrich (https://uea.org/teko/regularoj/regularo_biblioteka_apogo) antaŭ ol sendi vian subvencipeton, tiel ke ĝi estu plene en linio kun la tie priskribitaj kriterioj.*

Biblioteka Apogo Bachrich - starigita de UEA en 2014 danke al la malavara donaco de la gefiloj de gesinjoroj Bachrich (Venezuelo) - alfrontas unu el la plej senteblaj kulturaj bezonoj de la Esperanto-movado, subtenante Esperanto-bibliotekojn kiuj ne ricevas financan subtenon de ŝtata, urba aŭ alia nemovada instanco, kaj kiuj tial riskus ne havi sufiĉe da rimedoj por adekvate pligrandigi siajn kolektojn.

UEA laboras por krei pli kaj pli da similaj ebloj por plifortigi la Esperanto-kulturon kaj kuraĝigas al pliaj tiukampaj iniciatoj.

Fontoj: Gazetaraj Komunikoj de UEA

Interesa propono el Mongolio

Karaj legantoj! Per tiu ĉi mesaĝo, ni deziras informi vin, ke ĉe Mongola Esperanto-Societo funkcias landa filio de Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio, *IKEF-Mongolio*, kunlabore kun kelkaj mongolaj kompanioj, cele al plibonigado de la asocia financa bonhavo kaj al praktika utiligado de Esperanto en la komerca, turisma kaj aliaj kampoj.

La respondeculoj de la filio jam kontaktis diversajn kompaniojn, kun kiuj oni esploras pri ebleco de kunlaborado. Tial, ni petas kaj alvokas vin, kunlabori kun ni en komerca kampo.

Kiaj kunlaboroj interesus vin kun mongolaj kompanioj? Ekzemple ni povus peri eksportadon de lanaj produktaĵoj (*cashmere*). Tiu teksa fibro estas formita el la hararo de la kaproj *changthangi*. Pliaj informoj troveblas en la retejo: www.gobi.mn .

Ni proponas kunlaboradon en la komerca perado:

1. perado de eksportoj el Mongolio; 2. perado de importoj el eksterlandoj; 3. turismo; 4. kultura interŝanĝo (ekz. folklora ensemblo, arta kaj aŭ foto-ekspozicio ktp); 5. organizado de komercaj konferencoj kaj forumoj.

Bv. sendu viajn mesaĝojn, kun proponoj kaj demandoj: ni certe respondos al vi. Danke al progreso de la mongolia ekonomio stariĝas multaj industriaj kaj infrastrukturaj projektoj, enlandaj kaj internaciaj. Ni jam ekis kunlaboradon kun IKEF-Ĉinio en komerca kaj turisma kampoj. Elkore vin ni invitas kunlabori!

Nia iniciato, kiel modelo, eble naskos plurajn novajn ideojn por profesieca aplikado de Esperanto. Baldaŭ ekestos malfermo de nova asocia retejo kaj ankaŭ pri Esperanto-Komerco. Memkompreneble ni pagos multon por TTT-servilo kaj retej-konstruonto, tial ĉia kontribuo, eĉ malgranda, estos granda helpo al ni.

Amike salutas s-ro Khurgaa Dashdorj, Kasisto de IKEF-Mongolio. Konto ĉe UEA: meua-z

Novembra Programo

10a, vendredo	20h00 - Kunveno de asocianoj

Pro teknikaj kialoj, la asocio estos fermita ĝis la 30ª de novembro 2017

Decembra Programo

1a, vendredo	20h00 - Bildoj pri la 110ª datreveno de la Esperanto Societo Rijeka
8a, vendredo	**Sidejo fermita**
10a, dimanĉo	**10h30 - Zamenhofa Tago - "Nia Majstro en nuna Bjalistoko"**
15a, vendredo	**17h00 - Tago de la Libro Ekspozicio malfermita al la publiko.**
22a, vendredo	**20h00 - Kristnaska Festo Bildoj pri Policoro**
29a, vendredo	**20h00 - Adiaŭ, 2017ª jaro!**

Programo - Januaro 2018

5a, vendredo	20h00 - TEA en interreto
12a, vendredo	20h00 - Provoj pri legado kaj komprenado
19a, vendredo	20h00 - El malnovegaj ĵurnaloj
26a, vendredo	20h00 - Ni planu kune niajn estontajn programojn

◀ de la 2ª paĝo

donu, samideanoj! Se hodiaŭ eldonas specialan vortaron ekz. Budapeŝto, kial morgaŭ ne eldonu alian Parizo aŭ Varsovio? Kaj tiamaniere Esperanto, tiu perlo de simpleco, fariĝos eble la plej malsimpla lingvo de la mondo kaj iom post iom nova Babelo kreskos en la sino mem de la lingvo internacia!

Esperanto devas evolui, certe! Kaj la lingva evoluo sendube devas posttiri asimiladon de novaj radikoj kaj formoj. Sed la kriterio de l' akcepto ne estu: "tio kontentigas mian guston", sed: "tio estas necesa, por esprimi ideojn, alie neesprimeblajn, aŭ esprimeblajn tro artifike".

Se ni volus sekvi tiun ĉi regulon, kiom da "mornaj", "sinistraj", "tristaj" kaj "obskuraj" vortoj montriĝus senbezonaj...

Resume, ne kontraŭ la evoluo mi levas mian voĉon, sed kontraŭ tiu neologisma manio, kontraŭ tiu danĝera sporto, kiu, instigante siajn adeptojn al ĉiam novaj lingvaj artifikaĵoj, iom post iom forpuŝas Esperanton de ĝia idealo: lingvo internacia, simpla, facile komprenebla por ĉiuj.

Lidja Zamenhof

Daŭre aktuala, ĉu ne? Ni meditu pri tiuj ĉi absolute pravaj vortoj de la eminenta filino de nia Majstro!

Fonto: Pola Esperantisto – majo 1934 – n.ro 5

Lasta kvizo de la jaro 2017ª

Kiu sukcesos respondi ĝuste al la suba demando, gajnos belan premion!

Estis iam, komence de la pasinta jarcento, reĝino kiu interesiĝis pri Esperanto kiu fervore subtenis la landan Esperanto-movadon.

Ŝi jam junulinaĝe distingiĝis pro sia altkvalita muzikinklino kaj dediĉis sin al kantado kaj ludado de orgeno.

Talente ŝi ankaŭ pentradis, sed ŝia kreema fantazio kondukis ŝin survoje al la literaturo, kun aparta interesiĝo pri poezio, folkloro, lokaj legendoj pri la kamparana vivo. Ŝi produktis multajn verkojn, subskribitajn pseŭdonime. Ŝi donis la ekskluzivan rajton de tradukado de siaj ellaboraĵoj al la nacia Esperanto-movado.

La pola esperantisto Adam Zakrzewski en la *Historio de Esperanto 1887-1913* nomis ŝin "vera esperantistino".

Demandoj:
Kiel ŝi nomiĝas?
Kiu estis ŝia pseŭdonimo?
Mi atendas viajn solvojn! Bonŝancon al Vi!

Bonan Kristnaskon 2017an kaj Pacan 2018an Jaron al la TEA-anoj kaj Gelegantoj deziras Triesta Esperanto-Asocio!

Bulteno de Triesta Esperanto-Asocio
Redaktanto: Elda Doerfler - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit—IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.tea1906.altervista.org;
www.esperantotrieste.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org